

Pasporto

Esperanto

PARO DA SUDKOREANOJ TRAVOJAĜAS LA MONDON PAROLANTE ESPERANTON

Jam de 8 monatoj survoje, Ko Kyug Ja kaj An Jong Soo Jam trapasis pli ol 20 landoj, interŝanĝante informojn pri eltenebla energio

A ŭstralia, Tajlando, Ĉeĥio, Rumanio, Serbio, Kroatio, Boznio, Makedonio, Slovenio, Montenegro, Italio, Hispanio, Portugalio, Maroko, Brazilo. La itinero de la vojaĝo de tiu korea paro estas intenca. Li, ĉefeditoro de reta gazeto pri solidareco kaj paco; ŝi, magistrino pri edukado kaj doktorino pri arto, de la universitato Chugye.



Klopodante interŝanĝi informojn pri eltenebla energio kun ekologiistoj de la tuta mondo, An Jong Soo kaj Ko kyug Ja rondvojaĝis la planedon, ĉiam gastigante senpage ĉe la domo de tiuj, kiuj parolis la saman lingvon:

Esperanton.

Sed, kial Esperanton?! Kial ne la anglan? Bone, la respondo estas simpla: ĉar la angla estas ege malfacila por la orientaj popoloj. Esperanto, siaflanke, povus esti lernita post kelkaj monatoj. Kaj tion ili faris.

Neŭtrala internacia lingvo, kreita de la pola okul-kuracisto Ludwik Lejzer Zamenhof, Esperanto neniam ĉesis sian disvolviĝon, ekde sia kreado, en 1887. Nuntempe ĝi havas ĉirkaŭ du milionojn da parolantoj, dise loĝantaj en pli ol 150 landoj.

Post la kreskanta tutmondiĝo, la lingvo de D-ro Zamenhof allogas ĉiam pli da atentaj gejunuloj, kiuj deziras konatiĝi kun homoj el la tuta mondo pere de neŭtrala lingvo (kiu estas propraĵo de neniu lando, sed kontraŭe de ĉiuj, kiuj lernas ĝin).

An Jong Soo (li) kaj Ko Kyug Ja (ŝi) estas nur du el tiaj gejunuloj. Pere de la kontaktoj faritaj de ili uzante la internacian lingvon, ili kapablis plani la vojaĝon alimaniere ol la plejparto de la turistoj, kaj ili surpriziĝis pri kion ili malkovris.

"Ni lernis la anglan dum naŭ jaroj en Koreio, sed tio ne funkciis. Ni ne kapablis komunikiĝi."

Ko Kyug Ja: Mi ne konis la urbon Santos; mi nur aŭdis pri Rio kaj San Paŭlo. Sed Santos havas belegajn plaĝojn, kun vastaj verdaj lokoj! Multe malsame ol aliaj marbordoj!

La plejparto de la turistoj kiuj alvenas en ŝipo sekvas rekte al Rio al San Paŭlo. Konsiderante, ke ni havis senpagan gastigproponon ĉe esperantisto de la regiono, ni decidis resti iomete pli, kaj finfine amegis la lokon. Oni devus disvastigi pli la urbon Santos tra la mondo!



Kiu estis la plej grava malfacilaĵoj, kiun vi trovis dum viaj vojaĝoj?

An Jong Soo: Certe, la lingva problemo. Mi lernis la anglan en Koreio, sed ni malkovris, ke tra la mondo, la angla ne estas tiel ofte uzata, kiel ni imagis. Kaj, ĉar mi ne scipovas la lokajn lingvojn, ĉiam, kiam mi vojaĝas, mi serĉas geesperantistojn, por pli bone koni la urbojn kaj iliajn loĝantojn. Estas tre facile, trovi ilin per la interreto. Ili estas en ĉiu loko.



Ko Kyug Ja: Ni jam vizitis pli ol 20 landojn, kaj multajn urbojn ene de ili.

An Jong Soo: Ni restis en Aŭstralio dum tri monatoj. En Orienta Eŭropo, ankaŭ tri monatoj. Poste, ni pasigis unu monaton en la eksa Jugoslavio, vojaĝante tra la tuta teritorio, kiu nuntempe estas dividita en multaj landoj. Poste, ni iris al Italio, al Hispanio, kie ni restis dum 40 tagoj... Portugalio... kaj, sekve, ni venis el Lisbono ĝis Santos per ŝipo, post du haltoj, en Kazablanko kaj Recife.

Ko Kyug Ja: Mi estas instruistino de tradicia korea arto; pro tio, kiam mi vojaĝas tra la mondo, mi ĉiam klopodas paroli pri niaj tradicioj. Mi havas ret-taglibron, kaj mi ankaŭ skribas pri niaj spertoj por koreaj ĵurnaloj. Kiam ni reiros hejmen, ni eldonos libron pri la

mondvojaĝo, kaj certe estos multaj rakontoj rilate Esperanto.

Elspirante simpatian, la sudkorea paro daŭrigis sian vojaĝon. Ili ankoraŭ intencas iri al Paragvajo, Ĉilio, Argentino, Bolivio, Peruo kaj Nordameriko.

“Se mono nin permesas.”, ambaŭ konkludis, ridante. ■

Intervjuo realigita en Esperanto, ene de la redakciejo de la gazeto “A Tribuna” (Santos).

Ei la portugala, tradukis Emerson Werneck

Esperanto: lingvistika konstrublokoo

- ➔ 60% de la vortprovizo de Esperanto venas el latinidaj lingvoj, 30% el ĝermanaj lingvoj, 10% el slavaj lingvoj, kaj la gramatiko enhavas orientan logikon.
- ➔ Esperanto havas nur 16 gramatikajn regulojn, sen ekceptoj.
- ➔ Ĝia lernado, laŭ esploroj, pligrandigas la lernantan kapablon por rezoni logike, kaj reduktas je kelkaj jaroj la lernadon de aliaj lingvoj.
- ➔ Ĝi estas unu el la plej taŭgaj lingvoj por tradukado, ĉar ĝi estas ege fleksebla.
- ➔ Kiel en konstrublok-ludilo, vi povas kontrui vortojn, kiujn vi neniam aŭdis, uzante erojn de vortoj, kiujn vi jam konas, kaj vi povas meti la frazojn en la ordo, kiun vi trovu la plej taŭga, aŭ belsona.

Por lerni Esperanton: <http://eo.lernu.net/>

